

Kio estas SAT?

Enkonduko

En 1881, Zamenhof forlasis la Moskvan Universitaton por daŭrigi siajn medicinistudojn en la Universitato de Varsovio.

Samjare fondiĝis, reage al pogromoj okazintaj en Ukraino, la movado “Ĥibat Cion” (Amo al Ciono), en kiu li ekaktivis kun juneca entuziasmo. Sed, jam en 1885, kiam li vivis en la sudlitova urbeto Vejseje, li ĉesigis tiun aktivadon. Li eĉ ne plu rilatis kun tiu movado, kiam, en 1887, li publikigis la unuan lernolibron de la “Internacia Lingvo”, sub la pseŭdonimo “Doktoro Esperanto”.

En 1897, la granda cionisma movado de Herzl sorbis Ĥibat Cion. Zamenhof plue interesiĝis pri la evoluo de tiu ĉi afero, sed nek sin mem nek Esperanton li akceptis ligi al tiu strebado.

En 1914, li ricevis inviton ĉeesti la fondkunvenon de “Tutmonda Esperantista Hebrea Ligo”, en Parizo. Tiam li pravigis sian decidon ne aliĝi al la nova organizo per jena respondo:

“Mi estas profunde konvinkita, ke ĉia nacionalismo prezentas por la homaro la plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premantaj - kiel natura sindefenda reago - estas multe pli pardonenda, ol la nacio- nalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

*Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi, malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento, ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco **absoluta**. Mi estas profunde konvinkita, ke per **tio** mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma”*

(*Originala Verkaro*, p.344-345; eld. F. Hirt en Sohn, Leipzig, 1929)

En la Londona urbodomo - Guildhal - Zamenhof prezentis entute atentindan paroladon antaŭ la urbestro kaj la partoprenintoj de la 3-a Universala Kongreso de Esperanto (Kembriĝo, 1907). Menciindas jena frazo:

“Dum la pseŭdo-patriotismo, t.e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu, granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas.” (*Originala Verkaro* p.383.)

Kaj li aldonis:

“Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj!”

Jam du jarojn pli frue, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, en Bulonjo ĉe Maro, 688 partoprenantoj el 20 landoj povis aŭdi el lia buŝo jenajn vortojn:

“Ni konsciu la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj” (*Originala Verkaro* p.362).

Kvaronjarcenton poste, en 1930, aperis senkompleza studo titolita “**Naciismo**” (SAT, Leipzig, 1930. Ĝia aŭtoro, Lanti (pseŭdonimo de Eugène Adam) alvenis al pli preciza kaj pli drasta konkludo ol Zamenhof. Citindas almenaŭ kvar paragrafoj el tiu ĉi ne malaktualiĝinta verko, kiu senmaskigas tiun doktrinon:

“La naciisma edukado povas sukcesi, tial ke en la grandega plimulto de la cerboj regas ankoraŭ la dekomenca, absurda mistika tendenco. La esenco de la patriotismo estas ja pure mistika, superstiĉa. Tio montriĝas per la absoluto de ĝia moralo.

La naciismo estas eĉ la sola religio, kiu ankoraŭ postulas de la homoj vivoferon.

Post jarcentoj de luktado, la homoj en la pli-malpli kulturitaj landoj akiris la rajton aparteni aŭ ne al la eklezio, la liberon ĉeesti aŭ ne religiajn ceremoniojn. Sed neniu povas senpune rifuzi partopreni en la sangaj ceremonioj, la militoj, kiujn periode okazigas la diversaj naciismoj.

La patriotismo estas nuntempe la plej potenca ideologio; ĝi pasiege superregas la spiritojn kaj kapablas fari el pacemaj, bonkoraj homoj, batalemajn kaj sangavidajn bestojn.

La dekkvin milionoj da buĉitoj el la lasta mondmilito ne sufiĉis por satigi la monstron. La naciismo daŭre minacas la homaron.”

Kion Zamenhof esprimis relative delikate, tion Lanti povis diri sen ĉirkaŭfrazoj post persona sperto de la unua mondmilito, kiun Zamenhof ne postvivis.

Certe, ambaŭ same malestimis tiranisman, militarisman, militisman, ŝovinisman, ksenofobion kaj rasismon. Pro siaj infanaj travivaĵoj, Zamenhof volis proponi komunan lingvon al la Homaro, kaj li prave pensis, ke ia lingvo estus vivipova, nur se ĝi havus “internan ideon”, alidirite: sian propran spiriton.

Lanti malkovris multe pli ol taŭgan komunikilon en la Internacia Lingvo. Per ĝi li volis, ke laŭeble plej multaj homoj, kaj precipe la laboristaro - kiu ja konsistigas la plej gravan socitavolon de ĉiu nacio - konsciu la fontojn de la malfeliĉo, kiu trafas la Homaron.

Lanti pensis, ke la sola mondlingvo por ĉiuj alirebla kaj akceptebla - Esperanto - povus fariĝi ankaŭ instrumento de emancipado, de liberiĝo el la naciaj katenoj kaj valora helpilo en la kontraŭstaro al superstiĉoj, rezignacio, fatalismo. Lia ambicio celis meti Esperanton je la servo de ĉiu... al ĉiu individuo por sia memdefendo kontraŭ mensmanipulado kaj misinformado, kontraŭ la fanatikigaj efikoj de religiaj kredoj, politikaj ideologioj kaj

naciisma propagando.

Kiel kaj kiam naskiĝis S.A.T.?

La spirito, kiun ni trovis ĉe SAT, jam manifestiĝis komence de la nuna jarcento. Tiam ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Siberio, Ĉinio kaj Japanio, multaj laboristaj aktivuloj kaj pioniroj de sociaj movadoj havis tre profundan konscion - ofte eĉ pli ol nun - pri la rolo, kiun Esperanto povus ludi tutmonde en la konstruado de laŭeble plej justa socia sistemo. Ili taksis ĝin ne nur la plej taŭga translima komunikrimedo, sed precipe grava faktoro por emancipado de la popolamasoj, por mensevoluiga strebado, por socia progreso kaj Paco.

Kvankam Zamenhof aludis prudente pri tiu aspekto de la Internacia Lingvo - sendube por ne malutili al ĝia reputacio en mondo ankoraŭ ne sufiĉe matura kaj konscia por kompreni kaj akcepti tiujn principojn - li tamen montris komprenemon kaj esprimis sian aprobon pri la uzo de Esperanto serve al la pravaj aspiroj de la laboristaro. En letero al “**Laborista esperantisto**”, en 1910, li skribis:

“Eble por neniu en la mondo, nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristaro kaj mi esperas, ke pli malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo” (Pri Internacia Lingvo dum jarcentoj, Isaj Dratwer, Tel-Avivo, 1977, p 281)

La unua klubo de esperantistaj laboristoj fondiĝis en Stokholmo, en 1903. Laboristaj Esperantisto-organizoj aperis poste en Britio (1907), Hungario (1909), Bohemio, Germanio kaj Nederlando (1911). En Francio kunfandiĝis en 1914, sub la nomo “Franca Laborista Esperanto-Unuiĝo” la du organizoj “Liberecana Grupo Esperantista” kaj “ESFIO”, respektive fonditaj en 1905 kaj 1911.

Internaciskale organizita formo de laborista Esperanto-movado

aperis unuafoje en 1906, kiam fondiĝis, en Parizo, la “Internacia Asocio Paco-Libereco”. De ĝia kunfandiĝo kun la organizo “**Esperantista Laboristaro**”, en 1910, rezultis “**Liberiga Stelo**”, kies celoj kaj idearo grandparte inspiris tiujn de SAT.

Pluraj faktoroj influis kaj akcelis la kreiĝon de memstara laborista Esperanto-movado:

–Unue, la abomenindaĵoj de la unua mondmilito estigis konsciencvekiĝon en laboristaj kaj intelektaj medioj.

–Due, tiamaj novaĵoj pri la “Granda Revolucio” kaj la konstruo de socialismo en Sovetio ankoraŭ entuziasmigis grandan parton el la laborista mondo. Sekve populariĝis ideoj pri ĉeso de la ekspluatado de la proletaro kaj pri interfratiĝo, kio instigis multajn homojn pli atenti pri la problemo de lingva komunikado.

–Trie, en marto 1920 mortis eminenta figuro de la Esperanta-movado: Hector Hodler. Naskiĝinta en 1887 samjare kiel Esperanto, Hodler lernis la Internacian Lingvon, kiam li estis gimnaziano. En 1908, li fondis Universalan Esperanto-Asocion. Bedaŭrinde, li mortis nur 33-jara. Lia tro frua morto lasis la gvidadon de UEA en manoj de malpli elstaraj homoj rilate laborkapablon, mensostaton, talenton kaj organizemon.

Jam ok monatoj post la forpaso de Hodler, en novembro 1920, alvoko aperis en “Esperantista Laboristo”, oficiala organo de “Liberiga Stelo”. Ĝi difinis la taskojn de organizo fondota en Prago, okaze de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto, organizo, en kiu povus esprimiĝi ideoj kaj informoj pri socio, politiko kaj klasbatalo, kontraŭ militismo, religia sencerbigo, naciisma cerboŝtopado. Estas rimarkeble, ke la subskribo “Sennaciulo”, alia pseŭdonimo de Adam/Lanti, fariĝos poste la nomo de la organo de SAT.

En aŭgusto 1921, 79 laboristoj el 15 landoj, pioniroj liberiĝintaj el la lingvaj malhelpoj, kunvenis aparte en Prago. Kiel antaŭvidite, ili konkretigis sian decidon. Tiel naskiĝis SENNACIECA

ASOCIO TUTMONDA.

Kvankam tio aspektis tiutempe kiel skismo, bedaŭrinda apartiĝo, oni povas nun senpacie konsideri, ke ju pli da ekstermovadaj organizoj aŭ instancoj uzas Esperanton sendepende la Esperanto-movado, des pli bone por la Internacia Lingvo.

Estas nepre necese konsideri, ke SAT ne estas Esperanto-asocio laŭ la kutima senco de “asocio **por** Esperanto” aŭ “**po**esperanta asocio”.

Sennacieca laŭ strukturo, SAT estas socieduka, kleriga, helpa organizo, kiu adoptis ununuran kaj sennaciecan helplingvon: Esperanton; sekve ĝi estas **per**esperanto asocio.

Estas erarige, kaj povas esti malutile, malbone kaj eĉ danĝere por Esperanto aserti, ke SAT estas Esperanto-asocio. Tiaspeca aserto povus konduki malbonintencajn registarojn konkludi, ke SAT reprezentas la oficialan ideologion de Esperanto, kaj sekve malhelpi ĝian disvastigon kaj ĝian enkondukon en instruadon. Tial SAT devas resti ekster la nura por-esperanta aktivado, kaj dediĉi siajn fortojn nur al plenumo de siaj celoj. Por ne liveri pretekstojn al fi-reĝimoj, necesas konsideri, ke SAT estas ekstermovada; kontaktoj estas eblaj nur sur pure lingva tereno, aŭ en esceptaj okazoj, ekzemple kiam en majo 1952 UEA kaj SAT, en nefermita letero al Stalin, atribuis la kontraŭesperantan politikon de Sovetunio al lingva imperiismo. (*La danĝera lingvo Esperanto en uragano de persekutoj*, Ulrich Lins, l'omnibuso, Kioto, 1973, p.60)

Memkompreneble, SAT ne povas malinteresiĝi pri la sorto, evoluo kaj disvastiĝo de la sola laborlingvo, kiun ĝi uzas. Sed pri disvastigo de Esperanto, de la SAT-idearo, -celoj kaj -servoj en avangardaj medioj zorgas, sendepende de la neŭtralaj organizoj, Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj) ligitaj al SAT per Konvencio adoptita en 1928 en Gotenburgo.

Estas sendube granda bonŝanco por la Internacia Lingvo, ke pri ĝi jam tre frue interesiĝis laboristaj aktivuloj. Esperanto-

parolantoj ĝenerale konas la sorton de multnombraj projektoj de internaciaj lingvoj, kiuj abortis pro manko de propra spirito kaj de socia bazo en la laborista mondo: ili ne postvivis la eliron el la skribĉambro de siaj inventintoj. Eĉ ne deko el pli ol 600 pli-malpli longe vivetis, kaj oni povas rimarki, ke se plue vegetadas kelkaj el tiuj senanimaj lingvoprojektoj, tio ŝuldiĝas al maljunaj adeptoj kaj foresto de virinoj.

La fondo de SAT estis konkreta ago survoje al tutmonda organiziĝo de la laboristaro. Diversaj cirkonstancoj kaj obstakloj, ĉefe historiaj, malhelpis, ke ĝi fariĝu influa amasorganizo. Tamen jam en 1929-1930, antaŭ la subfosa agado de bolŝevistaj gvidantoj kaj persekutado de SAT fare de Hitler- kaj Stalin-reĝimoj, ĝi havis 6524 membroj en 1579 lokoj de 42 landoj.

La konscio pri la socia rolo, kiun Esperanto povus ludi en la formado de la mensostatoj favore al socia progreso tamen plu ekzistas dank' al SAT.

La spirito de SAT ekzistas latente en la cerbo kaj koro de milionoj da homoj sur la tuta tero...

Sed, kio estas la spirito de S.A.T.?

En la tuta mondo, homoj sopiras pri socia progreso kaj pli bonaj vivkondiĉoj, sed plej ofte ĉiu sopiras pri paco kaj sekureco nur por si mem. Ekzistas inklino havi laŭeble plej multajn rajtojn kaj avantaĝojn, sed tio kun laŭeble plej malmultaj sindevigoj. Mallonge dirite: la rajtoj por si, la devoj por la aliaj!

Pli profunda pripensado tamen konsciigas, ke socia progreso, pli bonaj vivkondiĉoj kaj paco ne estas definitive atingeblaj sen socia justeco, sen atento pri la socia situacio de la ceteraj homoj kaj popoloj, sen konstanta strebo kaj aktiva partopreno en la vivo de la socio kaj en la plenumo de la decidoj. Ne malofte okazas, ke homoj partianiĝas nur pro oportuneco, por akiri laborpostenon, avantaĝojn aŭ garantiojn, sed tute ne pro konvinko aŭ konsento pri la ideologio kaj celoj de la koncerna partio. Aliflanke, certaj partioj akceptas ĉiaspeciajn membrojn, ĉar por ili gravas pli la

kvanto ol la kvalito, por fariĝi influhavaj premgrupoj.

Ne malmultaj estas la homoj de modesta origino, kiuj post atingo de riĉeco aŭ alta socia pozicio, tute forgesas kaj eĉ perfidas la klason, de kiu ili devenas. Ili kondutas sin pli arogante, pli malestiminde ol burĝoj mem - kaj ili forgesas siajn ŝuldojn al la tuta socio. Neniu homo estas tute senŝulda al la socio, sed ja ekzistas homoj, kiuj ŝuldas al la socio... nur sian mizeron! Sekve la socio mem, kiun konsistigas ĉiu homo, devas zorgi, ke ĉiu povu plene disvolviĝi fizike kaj mense por havi indan vivon.

Egoismo estas fonto de konfliktoj kaj malsekureco samgrade, kiel senkonsidera helpemo povas kondukti senkarakterajn homojn al konstanta senkonscienco, malzorgemo, pasiveco atendemo, malprudenteco, almozetado...

Sekve, altruismo havas negativan efikon, se konsciiga, dekutimiga, emancipa agado ne akompanas ĝin.

La civitana edukado, kiun ĉiuj homoj ricevas en siaj respektivaj nacioj, medioj kaj familioj, estas tro malvasta, tro tendenca, tro unuflanka por prepari individuojn kaj popolojn al spirito de konstrua kunlaboro, interhelpo, reciproka estimo kaj solidareco. Tiaspeca edukado kondukas al senelirejo, ĉar ĝi malebligas kompreni, ke ĉies intereso troviĝas en la intereso de ĉiuj, kaj inverse.

Ekzistas landoj, kie la socia konscio, la sistemo de solidareco kaj sociaj garantioj atingas altan nivelon. Ofte oni pensas pri skandinavaj landoj, eĉ se ne ĉio estas efektive ideala kaj perfekta.

Malgraŭ multekostaj klopodoj kaj gravaj monrimedoj, malgraŭ la bonvolemo de iaj respondeculoj, prestiĝa organizo kiel UNESKO havas tre limigitan efikon sur la tereno de edukado por kunlaboro kaj paco, ĉar ĝi dependas de la aliĝintaj naciaj registaroj mem. El tio rezultas neebleco honeste pritrakti temojn tro ĝenajn por difinita registaro.

La problemoj de la nuntempa mondo ne konas limojn. Ili pensas naciece, eĉ naciiste, ŝoviniste, egoiste ĝis kompleta blindiĝo pri la

amplekso kaj interplektiĝo de la mondaj problemoj, kio malhelpas ties komprenon kaj sekve malebligas eltrovon de solvoj.

Tiel blindigas ilin la propraj personaj interesoj, aŭ tiuj de la limigita kolektivo - eĉ se nacia - al kiu ili apartenas, ke ili tute preteratentas la fakton, ke la sorto, bonstato kaj sekureco de ĉiu homo kaj popolo ligiĝas kaj interplektiĝas kun la sorto, bonstato kaj sekureco de ĉiuj aliaj homoj kaj popoloj.

La edukado, kiun ili ricevis, la influo de la medio, en kiu ili vivis kaj plue vivas, la unuflanka informado kaj aliaj faktoroj ne favoras liberiĝon el rigida, ekskluziva, malkomprenema kaj neevolupova medio.

La amasoj ne kutimiĝis al la necesa, por atingi plej altan ŝtupon de tuthomara civilizo kaj kulturo, *“eksterdogma sent-, pens- kaj agadkapablo”*, **kio estas fakte la gvidprincipo de SAT kaj ĝia spirito mem.** Oni povus aldoni *“eksterdogma sent-, pens-, kaj agadkapablo”*...

Laŭ Nova PIV, dogmo estas “Punkto de religia aŭ filozofia doktrino, kiun ties adeptoj konsideras fundamenta kaj nekontestebla...”

Malsama interpreto de sanktaj tekstoj kondukis al apartaj religiaj dogmoj, kaj sekve al skismoj kaj eĉ al konfliktoj, interreligiaj militoj, konspiroj, persekutoj, masakroj kaj agoj, kies intenca krueleco superas eĉ tiun de paganaj gentoj kaj de plej barbaraj sendiaj hordoj.

Cele al surtera potenco, religioj mem iam varbis, kaj plu klopodas varbi adeptojn, se ne perforte, se ne per rekta altrudo, almenaŭ per morala, socia kaj eĉ politika premo, dum ili predikas amon al la proksimulo. Aŭtentika amo certe ne bezonas tiajn procedojn por plene disvolviĝi kaj disvastiĝi; ĝi naskiĝas, disvolviĝas kaj disvastiĝas nur libere, sen altrudo. La historio de la Homaro atestas, ke religioj montriĝis pli ofte fontoj de kontraŭa fanatika malamo, de perversa kretenigo de la amasoj kaj senbrida krueleco ol de konstrua, fruktodona kaj feliĉiga amo.

Ĉiu meditu pri citaĵo de “**Mein kampf**” (Mia lukto), kiu fakte spegulas la spiriton de Hitler: “*Se vi deziras la simpation de la amasoj, vi devas diri al ili la plej stultajn kaj krudajn aferojn*”. Ni scias kien kondukas, en religio kaj politiko, la apliko de tiu ĉi principo resumebla per “Kredu kaj ne provu kompreni”...

Ni povas konstati, ke la plej aĉaj reĝimoj nun ekzistantaj plu daŭras surbaze de la sama principo, ofte kun aproba silento de religioj aŭ eĉ kun ties aktiva subteno, kaj kun la konsento de “modernaj, civilizitaj” potencoj, kiuj liveras armilojn ne nur al siaj “amikoj”, sed ankaŭ al la malamikoj de siaj amikoj!...

Popoloj povas kondukti tute fanatike kaj freneze pro mens-manipulado fare de senkrupulaj politikaj aŭ religiaj idoloj kaj ĉarlatanoj, de tiranoj aŭ pseŭdo-demokrataj gvidantoj. Eĉ homoj kun alta grado de instruiteco kaj multaj diplomoj povas kondukti malpli homece kaj pli superstiĉe ol anoj de primitivaj gentoj. Instruiteco kaj inteligenteco ne estas sinonimoj. Eĉ scienco povas blindigi homojn pri esencaj demandoj. Jam antaŭ pluraj jarcentoj, la franca humanisto Rabelezo skribis, ke “*scienco sen konscienco estas nur ruino de animo*”.

Usona profesoro iam observis homojn en frenezulejo, kaj rimarkis, ke unuarangajn respondecojn postulas ĝuste la plej deprimitaj maniuloj, skizofreniuloj, paranojuloj, megalomaniuloj. Li alvenis al la konkludo, ke same inklino trafas la politikajn gvidantojn kaj militestrojn: rigideco, nekapablo adaptiĝi, evolui, antaŭvidi novajn perspektivojn. Laŭ tiu profesoro, tipe paranoja estas reago de gvidanto, kiu havas la impreson, ke malamiko estas pli malbonintenca rilate al li, ol li mem estas rilate al sia malamiko, tiel, ke ĉia hipotezo pri bonvolemo kaj honesteco estas nebla.

Estas fakto, ke interpopolaj rilatoj povas komplete ŝanĝiĝi per edukado. Multe evoluis la sinteno kaj sentoj de du popoloj, kiujn oni estas povintaj kredi eterne malamikaj, nome la germana kaj la franca. Dum jarcentoj ambaŭ estis kvazaŭ dresataj en spirito de reciproka malfido kaj profunda malamo, tiel, ke senskrupulaj

gvidantoj sukcesis multfoje ĵeti unu kontraŭ la alian por reciproka buĉado. Per tio ili deturnis la atenton de ambaŭ popoloj dise de esencaj demandoj kaj problemoj, de tute eblaj solvoj, kaj postuloj pri socia progreso kaj pli bonaj vivkondiĉoj. Sama procedo estas plue uzata eĉ en landoj, kiuj sin pretendas civilizitaj.

En la kazo de Germanio, tiaj konfliktoj ne plu estas imageblaj kun Francio, ĉar ambaŭ apartenas al sama bloko. Amikaj rilatoj, kaj eĉ amrilatoj, naskiĝis multnombre en la daŭro de unu generacio.

Same okazis inter iam rivalaj potencoj, nome Britio kaj Francio, kvankam - relative freŝdate - francaj armiloj liveritaj al malamikoj de Britio mortigis britajn militistojn. Sed tio estas unu el la strangaĵoj, por ne diri monstraĵoj, de la t.n. “amikeco” inter naciŝtatoj. Bonŝance, pli kaj pli da homoj, kaj precipe da gejunuloj, opinias, ke ne valoras morti kaj mortigi, por tiaspeca ŝtata moralo.

Ni povas almenaŭ rimarki, ke per edukado de novaj generacioj estas eble krei jen amikojn, jen malamikojn, depende de la cirkonstancoj, de la gvidantoj, de la interes- kaj premgrupoj.

Tio tamen estas tre grava afero!

La kazo de Japanio, dum la dua mondmilito, prezentas alian pripensindan situacion, kaj ekzemplon de perfida ekspluatado de la kredoj kaj de la patriotisma sento, kiujn profitemuloj misinterpretas, kaj disvastigas por tiel manipuli la mensojn kaj konduki homojn al kruelaĵoj, suferoj, senutilaj sinoferoj, amasmortigoj, detruoj, abomenindaj senceĵoj. Kvankam tio estas nun apenaŭ imagebla flanke de la menciitaj popoloj, ekzistas tamen ne tre malnovaj ekzemploj pri kolektiva historia frenezigo, fanatikigo de la homamasoj - por ne diri ekstrema kretenigo - kaj tio ne nur en malplej evoluintaj landoj, sed ankaŭ en t.n. “civilizitaj” landoj. La observaĵoj de la jam menciita usona profesoro montriĝas pravaj laŭlonge de la historio.

Kio montriĝis realigebla inter amikiĝintaj popoloj aŭ nacioj -

kaj pri tio estus ankaŭ eble citi la preskaŭ subitan amikiĝon inter Egiptio kaj Israelio, en 1979 - tio povas efektiviĝi tutmonde per laŭcela edukado, ne nur en la lernejoj, sed ankaŭ inter la plenkreskularo, la laboristaro kaj popopolamasoj, per informado, lojala diskutado, senantaŭjuĝa komparo de faktoj, ideoj, spertoj kaj informoj. Kaj tiu ĉi postlerneja klariga aktivado koncernas la organizon SAT.

Granda estas la minaco, kiu ŝvebas super la socia progreso, libereco kaj paco, kiam naciismo kaj dogmismo, religia aŭ politika, entrudiĝas en la vivon kaj spiriton de popolo.

Pro tio gravas la dialogo, kondiĉe tamen, ke ĝi mem estu ne la celo, sed la rimedo por atingi interkonsenton aŭ kontentigan solvon de difinita problemo.

Apartan atenton meritas la statutparagrafo pri la celo de SAT, en kiu estas skribite, ke *“per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado, ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj”*.

Dogmiĝo de la instruoj ja minacas ĉiun partion; ĝi kondukas al pravigo de ĉiaj rimedoj; ĝi malebligas debaton kaj diskutadon pri difinitaj punktoj; ĝi estas la unua fazo de totalismo.

SAT ne estas politika partio. Sekve ĝi prezentas ŝancon de intelekta pliriĉiĝo kaj de kresko de la socia konscio por ĉiuj aktivuloj de politikaj partioj, laboristaj organizoj, sindikatoj kaj diversaj movadoj.

Konkretan ekzemplon pri la spirito de SAT ni trovas en **“Esperanto en perspektivo”**, en ĉapitro dediĉita al la postmilita evoluo de SAT. Estas skribite, ke *“pli ol aliaj Esperanto-organizaĝoj SAT etendis sian manon al tiuj membroj, kiuj mem suferinte sub faŝismo nun spertis la efikon de kolektiva kulpigo”* (*Esperanto en perspektivo*, UEA, Londono-Roterdamo, 1974, p.655)

Ekstraktoj de kelkaj el la kongresdeklaracioj povas iom klarigi la sintenon de SAT rilate al diversaj mondproblemoj:

La 72-a SAT-kongreso okazinta de la 24-a ĝis la 31-a de Julio 1999 en Karlovy-Vary, (Ĉeĥio):

- * apelacias al ĉiuj registaroj en la mondo aboli la mortpunon.
- * kondamnas ĉian “etnan purigadon” ie ajn en la mondo.
- * konstatas, ke la kapitalismo iĝas pli kaj pli insida, kaj alvokas la laboristaron aktivi kadre de la sindikatoj, kaj en ili starigi Esperanto-kursojn cele al internacia agado.
- * alvokas partopreni surstratan manifestacion la unuan de Majo 2000 en Bruselo (Belgio).

La 73-a SAT-kongreso, okazinta de la 15-a ĝis la 23-a de julio en Moskvo (Rusio) :

- * Firme opiniante ke la plej komplika konflikto iam havas alternativan pacan solvon, kondamnas iajn militojn kiel rimedojn por solvi iajn ajn problemojn de la nuna mondo, i. a. la militon en Ĉeĥio.
- * kondamnas ankaŭ iun ajn terorismon ĉu individuan ĉu ŝtatan ĉie en la mondo.
- * subtena ĉiujn pacbatalantojn en la mondo.
- * kondamnas rompon de la Biŝkeka konvencio ĉar tiel estas malhelpata libera senviza vojado kaj libera kontakto.
- * alvokas ĉiujn registarojn en la mondo respondi taŭge al la civitanaj movadoj por enkonduki en la realan, tamen nepran tutmondondiĝon, pli kaj pli da demokratio.
- * agnoskante, ke la kapitalismo, surbaze de la ekspluatado de la homoj, socio kaj naturo por profito de nur kelkaj homoj, estas la ĉefa kialo de niaj sociaj, politikaj kaj ekonomiaj problemoj, subtenas la nunajn disvastantajn movadojn, kiuj manifestacias

diverslande kontraŭ tiaj internaciaj instancoj kiel Monda Banko, Internacia Monda Fonduso, Monda Organizo por Komerco, kies kunvenoj estas nedemokratie komisiataj kaj kiuj strebas al transformiĝo de ĉio (eĉ de la vivo mem) en vendeblaĵojn.

* subtenas la formon de forta kaj kreema nehierarkia movado celanta al socio, en kiu la homoj ne ekspluatu kaj ne subpremu la aliajn homojn, komunumojn kaj naturon, cele al la mondo, kiu baziĝu sur la solidareco, kooperado, demokratio kaj ekologia vivtenado.

* subtenas la batalon de neregistaraj organizoj en Rusio por restarigo de malfonditaj decidpovaj ŝtataj mediprotektaj kaj arbarmastrumaj instancoj; tio estas nepra, eĉ ne sufiĉa kondiĉo por konservado de biodiverseco kaj naturaj heredaĵoj.

La 74-a SAT-Kongreso, okazinta de la 14-a ĝis la 20-a de julio 2001 en Nagykanizsa (Hungario) deklaras:

* La kongreso konstatas, ke en la nuna mondo regas pli kaj pli liberala tutmondiĝo trudata de grandaj kapitalismaj entreprenoj.

Tiu tutmondiĝo kondukas al profundiĝo de abismo inter riĉaj kajmalriĉaj tavoloj de la monda loĝantaro, ĉu en “riĉaj” landoj, ĉu en “malriĉaj” landoj.

* Ĝi instigas al pli granda ekspluatadoj, kaj al... sklavigo de infanoj kaj virinoj.

* Ĝi plipezigas la ŝuldoŝarĝon sur la malplej riĉajn landojn, tiel malebligante ties ekonomian kaj socian disvolviĝon.

* La Kongreso apogas klopodojn kaj batalojn kontraŭ la novliberalismo kaj kruda kapitalismo.

* La Kongreso kondamnas la politikon de tiuj eŭropaj registaroj, kiuj starigas novan feran kurtenon inter la okcidenta kaj orienta Eŭropo kaj la landoj de la t.n. Tria Mondo per enkonduko de vizaj reĝimoj kaj limigo de reciprokaj vizitoj de civitanoj el diversaj landoj.

- * Ĝi kondamnas la ekziston de mortpuno en multaj landoj.
- * Ĝi kondamnas ĉiujn subpremojn kontraŭ etnoj kaj popoloj kaj ankaŭ ĉiujn naciismojn.
- * Ĝi kondamnas false demokratajn reĝimojn kaj iliajn kontraŭlaboristajn agadojn kaj kontraŭstaras abolon de la festotago de la 1-a de majo.
- * La Kongreso subtenas ĉiujn tutmondajn organizojn, kiuj nun senperforte staras kontraŭ ne demokrate elektitaj jgrupoj (Monda Banko, Internacia Mona Fonduso, ktp.).
- * La Kongreso kondamnas la strebadon regi nian mondon je la profito de kelkaj riĉaj tavoloj de ĉiuj popoloj.

La 75-a Kongreso de SAT, okazinta en Alikanto (ES) de la 1-a ĝis la 7-a de julio 2002

- * konstatas, ke Esperanto estas tute taŭga en batalo por la lingvaj rajtoj kaj informas, ke SAT eldonis novan Plenan Ilustritan Vortaron kiel unu el la rimedoj en tiu batalo.
- * konstatas ke 60 aliĝintoj ne povis partopreni pro rifuzo de vizo, kaj protestas kontraŭ tiu malrespekto de la rajto je libera cirkulado.
- * alvokas al batalo kontraŭ ĉiaj limigoj de la liberecoj individua kaj kolektiva sub la preteksto de ŝtata reago kontraŭ iuj armitaj grupoj;
- * apogas la usonajn civitanojn kaj organizaĵojn, kiuj batalas kontraŭ la mortpuno
- * Ĝi alvokas al solidareco kun la palestina popolo kaj ankaŭ kun la israelaj civitanoj, kiuj aktivis kontraŭ la milito.

Interesa rimarko de doktorino Marjorie Boulton povas ankaŭ illustri tiun spiriton: Okaze de prelego pri “**La kompleksa tragedio de Norda irlando**”, kadre de Kultura Kunveno de SAT en Centro Pompidou, en Parizo, ŝi esprimis la opinion, ke estus bone, se troviĝus multaj SAT-anoj en Irlando... (1983.02.20)

Per tio ni povas konsideri la grandegan laboron, kiu atendas la SAT-movadon, kaj rolon, kiun ĝi povus ludi en interpopolaj rilatoj, en rektaj interhomaj rilatoj, en emancipado de la popolamasoj, en la starigo de laŭeble plej justa socio, kio estas ĝia ekzistokialo.

Statutoj de S.A.T.

Venas nun la momento prezenti ekstrakton el la statuto de SAT, kaj precipe la paragrafojn pri ĝia celo:

*Sub la nomo “Sennacieca Asocio Tutmonda” (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas: a) utiligi praktike la internacian lingvon **Esperanto** por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda;*

b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro;

c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj;

ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT;

d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiujn sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikat-movadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera

diskutado ĝi celas malebligi ĉe la membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondiskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn, kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Certe tio ĉi aspektas iom tro teoria, tiel ke kelkaj konkretaj ekzemploj estas utilaj:

a) **Pri praktika utiligo de Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda**, la membroj de SAT havas vastajn eblecojn rilati kun alilandaj laboristoj, kun sindikatoj kaj organizoj, rekte aŭ pere de esperanto-parolantaj membroj de la Asocio, des pli ke, laŭ paragrafo 26 - koncernanta la servojn - “ĉies devo estas tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, kaj ke ĉiu trovu en alia membro la plej bonan kaj la plej certan peranton por vojaĝo, informo, enketo, serĉoj, ktp”.

b) Translima interrilatado de la membroj estas ebla dank’ al la Adresaro kaj eventuale per la publikigo, en organo, de alvokoj, artikoloj, informoj, anoncetoj, kiuj koncernas aŭ povas interesi ne nur la membraron, sed ankaŭ la laboristaron, diversajn organizojn. La fakto, ke Esperanto-parolantoj aliĝas al SAT, kreas solidarecan senton inter personoj, kiuj konsideras Esperanton ne nur kiel tutmondan komunikilon, sed kiel emancipilon. Same kiel nacia lingvo estas uzata cele al kunigo de civitanoj aŭ eĉ diversaj etnoj sine de nacio, kaj por krei solidarecan senton de aparteno al la plej vasta komunumo: la Homaro.

c) **la kleriga, instrua kaj lerniga funkcio** efektiviĝas per la organo, “**Sennaciulo**”, la jara eldono de “Sennacieca Revuo”, per libro-eldonado, organizado de prelegoj, kulturaj kunvenoj, kongresoj, kaj dank’ al individuaj intermembraj interŝanĝoj.

ĉ) **Pri interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT**, tio estas tereno, sur kiu SAT-anoj povus ludi grandan rolon, ekzemple por havigo de informoj pri interesaj faktoj, spertoj, iniciatoj, eksperimentoj, klopodoj, rezistagadoj, kiuj povas interesi kaj koncerni diversajn organizojn (ekz. sindikatojn, politikajn partiojn, diverscelajn movadojn, kulturajn asociojn, ktp.) Necesas insisti pri la fakto, ke por SAT-anoj Esperanto ne estas celo. Pro tio oni konstatas, ke SAT estas kvazaŭ renkontiĝejo de Esperanto-parolantoj aktivuloj de plej diversaj organizoj, kies celoj kompletigas sin: socia progreso, homaj rajtoj, protektado de la medio, klerigo, pedagogio, paco, ktp...

Vera mozaiko de konstruaj ideoj, SAT jam ebligas al siaj membroj, per Esperanto, uzi reton de homoj diverslandaj, kies kompetenteco tuŝas plej diversajn temojn. Sekve estas tute nature, ke granda parto el la SAT-anoj jam aktivas ankaŭ en sindikatoj, laboristaj organizoj, progresemaĵ partioj, kaj ankaŭ ekzemple en pli-malpli konataj organizoj, naciaj aŭ internaciaj, kiel Amnestio Internacia, Internacia Civila Servo, Green Peace, Internacio de la Naturamikoj, Junulargastejoj, Internacia Federacia de Movadoj por Moderna Lernejo, kaj en medioj liberpensuloj, laikaj, liberecanaj, pacistoj, mondciivitanaj, kooperativaj, ekologiistaj, junularaj, Triamondaj, ktp...

d) **Pri kreado de literaturo en Esperanto, originala aŭ tradukita, spegulanta la idealon de la Asocio**, tio estas tereno, sur kio SAT multe aktivis inter la du mondmilitoj. La plej prestiĝa eldonaĵo de SAT estas nun la **Nova Plena Ilustrita Vortaro**, kompilita de profesoro Gaston Waringhien, kunlabore kun multaj eminentaj esperantistaj fakuloj. Aperinta en tri eldonoj, kaj dum 75-a SAT-Kongreso en Alikanto (julio 2002) prezentita, tute reviziita de dekoj da kompetentuloj sub ĝenerala gvidado de docento (universitato de Provence) Michel Duc Goninaz, kaj Klaŭdo Roux, direktisto pri esplorado en CNRS (Francia centro pri scienca esplorado). Lanti ĉiam treege insistis, por ke Esperanto,

same kiel ĉiu nacia lingvo, havu tre ampleksan vortaron.

Antaŭ PIV jam aperis pluraj eldonoj de la **Plena Vortaro**. Inter la plej prestiĝaj tradukoj eldonitaj de SAT aperis “**Vojo al Scienco de l’ Estonto**” de Fersman, iama prezidanto de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio, “**Tri Verkoj de Volter**” laŭ brila traduko de Lanti, “**La nuna stato de l’evoluismo**”, de Jean Rostand, iama membro de la Franca Akademio, “**Infano de la Malriĉuloj**”, aŭtobiografia romano de John A. Lee, novzelanda parlamentano, “**7000 tagoj en Siberio**”, de Karlo Ŝtajner, “**La Fremdulo**” de Albert Camus, Nobel-premiito kaj “**Vualo de l’ Silento**” de Ĝura...

Inter la originalaj verkoj eldonitaj de SAT troviĝas i.a. “**Vivo de Lanti**” de Ed Borsboom, “**Vojaĝo al Kazohinio**” de la hungara verkisto Sandor Szathmari, “**Scienco kaj pseŭdo-scienco pri heredo de raso**” de profesoro Paul Neergaard, “**Historio de SAT**”, diversaj libroj de Norbert Barthlemess kaj “**Leteroj de L.L. Zamenhof**”.

Speciale menciinda estas la rolo de la Broŝurservo de SAT (FR-47470 Beauville), kiu jam eldonis pli-malpli ampleksajn librojn kaj dekojn da malmulte kostaj, bone mimeografe kaj ofsete produktitaj broŝuroj, kies enhavo kaj temaro ofte aperas en la idearo de SAT. En tiu ĉi kolekto aperis reeldonoj de verkoj de Lanti.

SAT havas Literaturan Komitaton, kies tasko estas kontroli la manuskriptojn laŭ stilo kaj lingvo. Ĝiaj membroj apartenas al diversaj lingvogrupoj, kaj ĝia sigelo povas aperi sur lingve fidindaj libroj ne devige eldonitaj de SAT.

Klasaj celoj

La unua frazo, laŭ kiu unu el la celoj de SAT konsistas “**utiligi praktike la Internacian Lingvon Esperanton por la celoj de la laboristaro tutmonda**”, estas eble erariga en la nuna tempo.

Laboristo ja estas homo, kiu vivtenas sin per vendo de siaj

fizikaj kaj intelektaj kapabloj. Sekve, ankaŭ intelektuloj estas laboristoj. Estas memkompreneble, ke la SAT-agado koncernas ankaŭ la homojn, kiuj ne ankoraŭ laboras (gelernantoj, gimnazianojn, studentojn) kaj kiuj ne plu laboras profesie, aŭ definitive pro emeritiĝo aŭ kripleco, aŭ dum pli-malpli longa periodo, pro senlaboreco, akcidento, malsano aŭ aliaj problemoj.

Aliflanke, la paragrafo, kiu atentigas pri neceso, “*esti komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiu sin apogas diversaj klasbatalaj laboristaj partioj aŭ sindikat-movadoj*” klare montras, ke SAT celas, per praktika utiligo de Esperanto, servi al la laboristaj partioj kaj sindikat-movadoj aktivaj sur la tereno de klasbatalo.

Klasbatalo estas, laŭ Nova PIV, “*neevitebla opozicio inter senperaj produktantoj, kiuj efikigas la produktorimedojn, kaj ties proprietuloj, kiuj alproprigas al si la plusvaloron*”.

Sekve, klasbatalo ne estas klopodo naski sentojn pri blinda malamo kontraŭ aliaj homoj, laŭ la trompa skemo “dekstrularo-maldekstrularo”. Ĝi celas konsciigon de la laboristaro, ke malgranda minoritato senskrupule akaparas al si multe pli ol ĝi bezonas kaj meritas ricevi, dum homoj vivas en stato de nerva aŭ fizika laceco, de neceso, mizero kaj malsekureco.

Klasbatalo estas prava rezistado de ĉiu konscia civitano de la mondo, por ke ĉiu Terano havu eblecon vivi dece kaj inde, la ebleco plene disvolviĝi mense kaj fizike. Ĝi estas necesa kontraŭstaro al la akaparemo de parazitoj, t.e. de profitavida minoritato, kies riĉegeco baziĝas aŭ sur sistema, grandskala kaj laŭleĝe permesata ŝtelado, aŭ sur laŭleĝe punenda sed neniam punata ŝtelado, aŭ sur rabado kaj koruptado. Por plu regi, riĉposedantoj klopodas dividi la laboristan klason en du blokojn inter si malamikajn laŭ la apozicio “Dekstrularo-maldekstrularo”, dum fakte la ekspluatatoj konsistigas la grandegan plimulton en ĉiuj landoj. Klasbatalo estas des pli necesa, ke la akaparemuloj misuzas la akiritajn profitojn por luksa vivo, por koruptado kaj precipe por brutigo kaj stultigo de la amasoj.

Rimedoĵ de S.A.T.

La ĉefa rimedoĵ ja estas Esperanto, kies valoro estas netaksebla sur la terenoĵ de komunikado, kulturo, klerigo kaj edukado, des pli ke ĝi estas la sola lingvo, kiun mezinstruita kaj mezinteligenta homo de iu ajn popolo povas utile uzi post akceptebla lernperiodo, eĉ sen lingvoinstruo aŭ kursgvidanto. Tial la sola laborlingvo de SAT estas Esperanto.

Per sia reto de membroĵ en preskaŭ 50 landoĵ, SAT jam prezentas ekzemplon kaj modelon de laborista organizo, kiun multaj pli grandaj organizoĵ povus envii, ĉar ĝi estas la sola monda laborista organizo, kiu ebligas al ĉiuj siaĵ membroĵ rekte komuniki sen lingvaj malhelpoĵ.

Nek Esperanto-asocio laŭ la kutima senco de la esprimo, nek faka Esperanto-asocio, nek politika partio, nek nacia organizo, eĉ ne internacia laŭ strukturo - t.e. sen ligiloĵ kun iu difinita nacio - SAT estas libera kaj aŭtonoma rilate al la Esperanto-movado, al la politikaj partioĵ, ideologioĵ kaj nacioĵ. Ĝiaĵ membroĵ aliĝas individue, memstare, plenkonscie. Povas aliĝi al SAT nur persono, kiu kapablas esprimi sin en Esperanto kaj kiu akceptas la statuton.

Pri disvastigo de Esperanto en medioĵ laboristaj, progresemaĵ, avangardaĵ, t.e. la **po**resperanta laboro, zorgas Laborista Esperanto-Asocioĵ (LEA-oĵ). La agadtereno de la LEA-oĵ ligitaj al SAT per la Konvencio de Gotenburgo etendiĝas principe ne laŭ naciaĵ landlimoĵ sed laŭ lingvoteritorioĵ.

LEA-oĵ ekzistas nur por regionoĵ, teritorioĵ aŭ landoĵ de lingvoĵ germana, angla, hispana, sveda kaj franca. En la LEA-Komitato kunlaboras ankaŭ ASLE (Aŭstria Socialista Ligo Esperantista).

Plej bonan pozicion havas SAT en landoĵ, kie ekzistas aktivaj LEA-oĵ aŭ kunlaborantaj organizoĵ, sed Japanio estas ĝis nun unu el la esceptoĵ, ĉar tie ekzistas aktiva kerno de SAT-anoĵ, kaj bona kompreno de la SAT-celoĵ fare de la japanaj Esperanto-asocioĵ.

SAT-Kongresoĵ okazas ĉiujare, precipe fine en julio aŭ komence de aŭgusto. La fondkongreso, en Prago, arigis 79

partoprenantojn en 1921. La rekorda partopreno estis 1325 en 1949, en Parizo. Ne okazis kongresoj de 1940 ĝis 1946. La 75-a okazis en Alikanto, en 2002.

La gvidinstancoj de SAT estas Plenum-Komitato, kaj Ĝenerala Konsilantaro. La elekto okazas ĉiun trian jaron (Statuto, paĝoj 7 ĝis 9).

Konklude

SAT estas unika. Ĝiaj principoj, celoj, strukturoj kaj statuto prezentas vastegajn, apenaŭ ekspluatatajn eblecojn sur la kampo de socia progreso kaj aŭtentika tutmonda civilizo. kaj ĝi povas esti, por analogcelaj organizoj, la fonto de intelekta kaj menso pliriĉiĝo, de efikeco kaj regenerigo.

En SAT havas lokon ĉiu persono, kiu volas ĉiel ajn kontribui al socia progreso, emancipa aktivado, al starigo de mondo, en kiu la ŝancoj de plena individua disvolviĝo estos laŭeble plej altaj, en kiu la tribecaj artifiko, la malraciaj principoj de nacia suvereneco, cedos lokon antaŭ la principoj de individua respondeca suvereneco.

La teksto, originale, estas prelego de Henri Masson kaj aperis en la "SAT-Broŝurservo", FR-47470 Beauville.

Ĉiuj estas liberaj kopii ĉi tiun tekston kaj uzi ĝin por propagandi, kiel eble plej efike, nian asocion SAT.

(julio 2002)

Aldono al Kio estas SAT

(verkita en printempo 1990)

La celo de SAT estas alia ol disvastigo de Esperanto. Kompreneble ĝi havas intereson en laŭeble plej vasta aplikado de Esperanto en la rilato inter diverslingvanoj.

Pro tio ekzistas Laboristaj Esperanto-Asocioj ligitaj al ĝi per konvencio; espereble fondiĝos pliaj. Sed per la utileco kaj fidindeco de siaj informoj, per la valoro mem de sia agado, SAT povas multe pli efike kaj konvinke influi favore al esperanto ol se ĝi estus plia poresperanta organizo.

La nuna situacio de la mondo konfirmas la pravecon de la principoj kaj celoj de SAT, sed ankaŭ de ĝia aktivado kaj sinteno. La rolo de SAT ne konsistas aliĝi al doktrinoj, reĝimoj, partioj, sed ebligi utilan komparon inter ili.

SAT devas firme resti la voĉportanto de la milionoj da homoj, kiuj restis senvoĉaj dum jardekoj, same sub devojiĝinta komunismo kiel sub la ankoraŭ nun tumulta kapitalismo.

Certe la nuna evoluo de la monda situacio estas pozitiva laŭ multaj aspektoj. Forfalis landlimoj kaj murego, idoloj kaj tiranoj. Malaperis obstakloj al interrilatado kaj interŝanĝoj. Ekestas nun rilatoj, se ne de amikeco, almenaŭ de kunlaboro inter landoj konsiderataj nur antaŭ kelkaj monatoj kiel apartenantaj al malamikaj blokoj. Perspektivoj de senarmiĝo ekaperas en Eŭropo, kiu estis foje ĉe al rando de gravaj konfliktoj. Plifortiĝas ĉie la konscio pri neceso respekti la naturon. Tiu ĉi grava transformiĝo okazas sen milito. Tamen la horizonto estas nek hela nek klara. Aperas kompleksaj problemoj.

Malfortiĝo de regpovo, kia ajn ĝi estas, neeviteble estigas alfluron de diverstendencaj fortoj, kiuj provas okupi, akapari la forlasitan lokon.

Primitiva interpreto de religiaj preceptoj principoj aŭ dogmoj

starigas kreskantan minacon, kiun oni estus supozintaj aparteni al fora pasinteco. Religio ree fariĝas mensa narkotaĵo de popoloj. Multege da individuoj tra la mondo ankoraŭ inklinas kulti iun dion, en kiu fakte respeguliĝas ilia propra psika konfuzo kaj pervers(i)eco. Miksiĝas malracia pensado, fasciniteco, naiveco, obseda kredo, mensa ebriiĝo, histeria eksciteco, fanatikeco, krueleco kaj senrezerva submetiĝo al tutpovaj gvidantoj. Tiaj mensostato kaj sinteno estas en absoluta kontraŭdiro kun la noblaj ecoj, kiujn kredantoj atribuas al sia dio, t.e. senlima amo, boneco kaj justeco.

Rilate al politiko same kiel al religio, ekzistas kredantoj kun kredemoj. Ekzistas sinceraj homoj absolute honestaj, kiuj tro facile kredas je la sincereco, klarvideco, senerareco, lojaleco kaj skrupula honesteco de siaj gvidantoj. Blinda akcepto de dogmoj ambaŭkaze kondukas nur al same monstra soci(mal)ordo.

SAT devas absolute kaj rigore konservi sian plenan liberecon kaj sendependecon rilate al kiu ajn partio, religio, filozofio, dotrino kaj reĝimo tute same kiel rilate al kiu ajn nacio.

Oni povas eĉ aldoni al la SAT-slogano: “SAT-anoj kutimiĝu al eksterpartia (reĝima, doktrina, religia, filozofia, skola ktp...) sent-, pens- kaj agadkapablo.” Nur tiel ĝi povos utile atentigi pri danĝeroj de devojiĝo, kaj tiel plene servi la laboristaron, kaj finfine eĉ la tutan Homaron.

De individuoj, kiuj senĉese atakis, misprezentis, aĉe insultis SAT, denunciis ties membrojn tiel ke ili estis foje viktimoj de persekutoj kaj devigataj ekŝiĝi el nia Asocio, ni certe ne devas akcepti lecionojn de demokrateco, de toleremo.

Ni ne miru, se iu grupo, kies gvidantoj senrezerve aprobis kaj laŭdis reĝimojn kiuj silentigis milionojn da laboristoj dum jardekoj (inkluzive de multaj komunistoj), nun pretendeme kaj aplombe proklamas sin kiel avangardo de glasnoto kaj perestrojko, por kiuj fakte nur SAT senĉese kaj konkrete aktivas

jam de sia fondiĝo! Tiam ekzistis ne la vortoj, sed ja la principoj. Ni ne miru, ke ĝuste kelkaj el ili plej brue prezentiĝas kiel ĉampionoj de kunlaboro, kvazaŭ de novnaskitoj ili havus moralan virgecon, senkulpecon. Ni ne miru, ke en ilia vortaro kutime insulta al SAT aperas subite mildaj vortoj kiel “toleremo”, “kunlaboro” ks. Tamen la insultoj kaj minacoj reaperas ne malpli subite, se troviĝas homoj sufiĉe klarvidaj por ne jesi al tia prozelita flirtado... Ne sufiĉas laŭvoĉa aroganta proklamado favore al perestrojko kaj glasnoto. La principoj de entrudiĝo en organizoj (aŭ en kerniĝo; t.e. france: “noyautage”) tute ne malaperis al la strategio de iamaj stalinistoj. Jam unu fojon SAT spertis tion fine de la jaroj '20. Tio sufiĉas!

Multege da honestaj komunistoj ne meritis tiun baton. Certe kun ili ni devas rilati kompreneme kaj fratece, se ili humile agnoskas, kun efektiva bedaŭro ke, pasive aŭ aktive, ili erare subtenis fireĝimon; se ili pruvas per konkreta agado ke ili volas malebligi tian refalon. Ne ekzistas homo, kiu iam ne estis pli-malpli grave trompita. Certe ni devas kompreni kiom amara estas tia seniluziigo por homo, kiu malavare foroferis la plej grandan parton de sia vivo por idealo, kiun aliaj homoj senskrupule makulis, kaj kiu konstatas, ke malantaŭ sloganoj estis ne nur mistifiko, mensogo, trompado, sed ankaŭ koruptado, maljusteco kaj eĉ nenombreblaj krimoj.

Kiu el ni ne konstatis mensostaton de klasmalamiko ĉe iuj laborkolegoj, inklinton kondukti malpli noble ol iamaj aŭ nunaj ekspluatistoj? Tio estas kialo de la perversa devojiĝo de politika povo pseŭdolaborista, kiu naskis specon de gvidantoj pli emaj zorgi pri propraj interesoj. Klasa ŝovinismo ne kredigu, ke riĉulo estas nepre malhonesta, entreprenisto senskrupula, intelektulo perfida, deputito ne nobla, nobelo reakcia, militisto sangavida, religiulo fanatika, kaj ke nur malriĉulo estas honesta, laboristo noblanima kaj laborema. “Estas bonuloj ĉie; estas fiuloj ĉie,” diris simpla araba balaisto de mia entrepreno. Tio certe levas gravan demandon pri ekzisto-kialo de la vorto “klasbatalo” en nia statuto.

